
# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - **66000 PERPIGNAN** (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : **5** F. C.C.P. 956-28 Montpellier



2-a Kvaronjaro 1976 —— N° 59

# Béziers - Federacia Kongreso 1976

Kvankam, bedaùrinde, la membroj de nia federacio ne sufiĉe partoprenas niajn printempan kaj aùtunan laborkunsidojn, oni povas tamen plezure konstati, ke tiuj kiuj kutimas veni - preskaù ĉiam oni retrovas la samajn vizaĝojn - tre utile laboras.

Kiel pruvo mi invitas vin atente legi en tiu ĉi numero la protokolon pri niaj laboroj kiun mi sendis al U.F.E. antaù la nacia kongreso.

Vi povas rimarki, ke la trideko da gesamideanoj kiuj kongresis en Béziers la 14-an de marto ne perdis sian tempon kaj sufiĉe multe laboris en la intertempo de tri horoj.

Ni devas sincere gratuli niajn Béziers-ajn geamikojn pro la tre bona aranĝo de la tuta evento. La kunvenejo en la Komerca Ĉambro estis tre oportuna, ne tro sed sufiĉe granda kaj longa ortangula tablo ebligis la senceremonian kuneston, kio pli faciligas la kontakton.

La federaciaj estraro kaj konsilio estis reelektitaj kaj ni devas aparte saluti la envicigon de S-ino NEGRON el Lunel.

S-ro DELIGNE agrable surprizis nin per ĝojiga situacio de niaj financoj. Lian financan raporton vi trovos en tiu ĉi numero.

Ĉar ni parolas pri financoj notindas, ke D-ro SALAN, en Béziers, vendis 9 ekzemplerojn de sia libro "La nuda vero" kaj ke po ĉiu tie vendita libro li lasis 10,00 Frs. por la federacia kaso (do, sume, 90,00 Frs.). Ni tre dankas lin pro tiu neta profito por nia kaso.

D-ino VIERNE raportis pri la preparlaboroj de la kongreso de U.F.E. kiu okazos, je Pasko, en La Grande Motte. Ŝajnas, ke la partopreno estos kontentiga ĉar, unu monaton antaŭ la kongreso, oni nombris 143 aliĝitojn kaj sufiĉe nombra partopreno de hispanoj, ne ankoraŭ enkalkulitaj, estis esperata.

La komuna tagmanĝo arigis la kongresanojn en tre amika etoso kaj poste ĉiu povis programi la posttagmezon laŭ sia bontrovo kaj, ĉiukaze, konservis la impreson de sukcesa tago por nia federacio.

La aŭtuna laborkunsido okazos en Sète dimanĉon la 17-an de oktobro. La grupo de Montpellier okupiĝos pri la aranĝo de la afero pri kies detaloj ni certe povos skribi en la venonta numero de "Sudfrancia Stelo".

(Protokolis Jean AMOUROUX).

---

AL LA ESTRARO DE U.F.E.

La membroj de la federacio Langvedoko-Rusiljono kongresintaj en Béziers la 14-an de marto 1976:

1° - elektis la federaciajn estraron kaj komitaton kiuj konsistas el:

<u>Prezidanto</u>: S-ro LLECH-WALTER
<u>Vic-Prez.</u>: D-ino VIERNE
<u>Sekretario</u>: S-ro AMOUROUX
<u>Kasisto</u>: S-ro DELIGNE
<u>Bulteno</u>: D-ro SALAN - S-ro FRUS
<u>Membroj</u>: S-ro ANGEVIN, S-ino AUTHIER, S-ino NEGRON, S-ro PELLETIER, S-ro RAYNAUD, F-ino TERRAL, S-ino VOLPELIERE.

2° - voĉdonis pri la jarraportoj de U.F.E. kaj renoviĝo de triono de la konsilio
<u>Rajtis voĉdoni</u>: 31 <u>Voĉdonis</u>: 18

| | | | |
|---|---|---|---|
| a) <u>agadraporto</u>: | Jes: 18 | Ne: 0 | Sindeteno: 0 |
| b) <u>financa raporto</u>: | Jes: 18 | Ne: 0 | Sindeteno: 0 |
| c) <u>buĝeto 75/76</u>: | Jes: 17 | Ne: 0 | Sindeteno: |

d) <u>konsilio</u>: (la ciferoj indikas la aprobojn):

| | | |
|---|---|---|
| S-ro BUDIMIR: 12 | S-ro DEGRELLE: 10 | S-ro DESPINEY: 15 |
| S-ro DESSAPT: 17 | S-ro BACHEVALIER: 12 | S-ino CASH-LIOUVILLE: 18 |
| S-ro MANCEAU: 14 | S-ro ROUSSEAU J.A.: 18 | S-ro ROUSSEAU P.: 14 |
| D-ro TORTEL: 14 | | |

3° - elektis la reprezantanton de nia federacio en la Grande Motte:
S-ron LLECH-WALTER

4° - aprobis, post kelkaj modifoj en la tekstoj, kaj atentigas la estraron kaj konsilion de U.F.E. kunvenontaj en la Grande Motte pri le jenaj konsideroj kaj sugestoj:

a) <u>propono de S-ro AMOUROUX</u>:
Estas bone ke U.F.E. konservis du bazajn tarifojn por la kotizoj. Ja estus grava eraro kunfandiĝi la du kategoriojn.
Laŭlonge de la jaroj ambaŭ tarifojn oni devas reĝustigi <u>samproporcie</u> - ne unu pli rapide ol la alia - surbaze de la evoluo de la monvaloro.

b) <u>propono de D-ino VIERNE</u>:
Ni sugestas ke, por ricevi monon de ne esperantistoj, U.F.E. kreu kategorion "Amis de l'Espéranto".


c) <u>propono de S-ro AMOUROUX</u>:
Ni sugestas ke, post likvido de la nuna "fonduso-materialo", U.F.E. lanĉu konstantan fonduson "revuo" kaj, jam de nun, instigu la kolektadon de pagitaj komercaj reklamoj por ebligi plibonigon kaj pli oftan aperigon de "Franca Esperantisto" ĉar evidentiĝas ke ĝia ofteco, reguleco kaj prezento, ekstera kaj enhava, ĉio dependos por

varbi novajn membro-abonantojn.

d) propono de S-ro LENTAIGNE:

Rezolucio: "En la momento, kiam oni povas konjekti, ke Parlamento favore konsideros la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, U.F.E. atentigas siajn membrojn kaj speciale ĉiujn pedagogojn pri la neceso perfektiĝi kaj atingi plej altan ŝtupon en la kono de la lingvo, tiamaniere, ke ĉiu akiru la necesajn kompetentecon kaj aŭtoritatecon por instrui la lingvon al lernantoj aŭ studentoj kies ĝeneralaj lingvaj konoj povas esti jam altaj".

---




# FINANCA RAPORTO OKAZE DE LA KONGRESO EN BEZIERS, LA 14-an DE MARTO 1976.

Mi esperas, ke vi bonvolos min pardoni, se tiu raporto estos prezentita al vi ne kiel kutime.

Ja, mi devos foresti ek/de la 27a de februaro, kaj mi ne scias ĉu mi estos reveninta sufiĉe frue por ĉeesti la kongreson.

Do, mi haltigis nian financan situacion je la 17a de februaro, kaj S-ro LLECH-WALTER aŭ S-ro AMOUROUX ĝin prezentos al vi.

Hodiaŭ nia financa situacio estas la jena:

Ni havas:

| | |
|---|---|
| En la poŝtkonto...................... | 921,12 |
| En la kaseto......................... | 318,35 |
| En la ŝparkaso....................... | 683,00 |
| DO entute.... | 1.922,47 |

Tiu situacio ŝajnas sufiĉe bona. Memoru ke, pasintjare je la sama dato, nia tuta havaĵo konsistis el 1.340,00. Do ĝi kreskis proksimume je 600,00.

Tio devenas de diversaj faktoj:

1 ° - La federacia parto de la kotizoj kreskis

2 ° - Kvankam mi ne havis la tempon tion kontroli, mi havas impreson, ke mi ricevis pli da kotizoj ol pasintjare.

3 ° - La situacio de SFS ankaŭ pliboniĝis.

Ĉi-jare la deficito konsistas nur je 27,00, anstataŭ 227,00 okaze de nia kongreso en Lunel pasintjare. Tamen mi pagis 500,00 en junio por la renovigo de la frontpaĝo de nia revuo. Krome, mi jam ricevis 104 abonojn por 1976.

Kondiĉe ke la prezoj de fabrikado, kaj la nombro de niaj abonantoj restos la samaj, ni povas esperi ke nia SFSa ĉapitro estos profitdona okaze de nia venonta kongreso.

\+ + +

Ĝis hodiaŭ, la kvarkoloraj afiŝetoj de nia amiko RAYNAUD donis profiton je 263,00.

Kaj la zamenhofaj poŝtkartoj de nia amiko AMOUROUX donis profiton je 191,30.

Maurice DELIGNE.

# VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Ni ricevis peton de S-ro JOVAN NEŜIĈ
Trebinjska 11
18000 NIS Jugoslavio.

Mi havas unu amikan familion konsistantan el tri membroj: li - 38jara publicisto, ŝi - 36jara komercistino kaj ilia filo 11jara. Ili havas tre bonajn kondiĉojn por akcepti gastojn, sed sur reciproka bazo. Ili vivas en Zagrebo. Ambaŭ estas geesperantistoj. Ili volas kontakti iun du aŭ trimembran familion, je similaj aĝoj, por ambaŭflanke aranĝi la aferon de reciproka gastigado (minimume du semajnoj, maksimume unu monato).

Viro estas membro de IEKA. Mi forgesis mencii, ke ili volas kontakton kun iu franca familio.

Ĉu iu mezaĝa familio interesiĝas pri reciproka gastigado en via loko, aŭ ĉu vi povas rekomendi iun familion, kiun ili povus unue skribe kontakti? Se jes, mi atandas adreson.

Informis S-ro Jean GUILLAUME, ĉefdelegito de U.E.A., 66, de Grasse Village - 78810 - Feucherolles.

---

I.P.T.E.A.
Internacia poŝtista
Esperanto-Asocio - Franca Sekcio
B.P. 126 - 05000 Gap Cedex
CCP: Lyon 6052-52

KORESPONDAS NUR en ESPERANTO
TEL. (92) 51 43 50 ejo 422

Karaj Gesamideanoj,

Certe, vi havas gefilojn, genepojn, genevojn, kiujn vi volus plezurigi. Jen unika okazo por tion fari. Ja nia sekcio projektas fabrikigi T-Trikotojn (Tee-shirts) kun Esperanto-surskribo. Jen ankaŭ bonega okazo por propagandi nian lingvon, kiam ĉe ĉiuj stratangulojj (en televido, en radio, en komerco, en sporto) ni ĉiuflanke estas atakataj de la anglalingvaj sloganoj. Jes ni opinias ke ni, esperantistoj, estas tiel modestaj ke multaj ne scias pri nia ekzisto, dum aliaj konscie volas nin ignori. Jen senprecedenca okazo por montri ke ni ekzistas, ke Esperanto vivas. Tamen, nepre notu ke temas pri disvastigo kaj neniel pri komerca afero. Tiel la mendontoj povos mendi nur por si mem aŭ por donaci al konatoj,kaj grupoj povos akiri nur por disdoni al siaj membroj aŭ per la kanalo de varbo de simpatiantoj aŭ bonfarantaj membroj. Kiel vi vidas ni konsentos aparte favorajn prezkondiĉojn al la grupoj cele helpi ilian kason kaj ilian varbadon.

Esperante ke ĉiuj diligentos por permesi sufiĉe grandan fabrikadon, ni elkore antaŭdankas pro via partopreno.

La Prizorganto: R. COLNEY.

P.S. Bonvolu noti ke la unuaj mendoj estos servataj ne antaŭ la fino de julio 1976. Post lego kaj mendo, bonvolu transdoni aŭ transsendi tiun cirkuleron al najbara grupo aŭ al izolulo.

---

# L I B E R A   T R I B U N O

Nia samideano, D-ro SALAN, publike diskursis antaŭ kelka tempo en urbo de sia departemento okaze de solena memoro.

Ĉar la regiona politika gazetaro favore diseĥis ĝin, ni opinias, ke la esperantlingva traduko de tiu parolado interesas niajn legantojn.

Jen ĝi:

## Solena memoro

Ni kunvenis hodiaŭ por memori solene eventojn kiuj okazis antaŭ 35 jaroj, se ni ilin situigas dum la jaroj 1941-1942.

35 jaroj jam pasis. Laŭ la historiistoj tio estas necesa malproksimeco por ke oni povu utile kaj sane vidi kaj juĝi. Vidi kion ni faris, juĝi kiaspirite ni luktis, kaj unue kaj ĉefe studi la kialojn pro kiuj ni estis rezistantoj.

Pri tio mi ĵus parolos.

Kial do ni fariĝis rezistantoj? Nedubeble pro motivoj tute simplaj kaj klaraj.

Estas false aserti, ke ĉiuj rezistantoj eniris Rezistadon tra la sama vojo kaj pro samaj kialoj.

Oni povus facile apartigi diferencajn tavolojn da rezistantoj al kiuj rilatas diferencaj rezistadmotivoj.

El la akre kontrasta amaso de ĉiuj tiuj ĉi tavoloj, nin interesas nur tiuj kiuj atendis por ke naskiĝu en ili rezistanta animo, nek la elŝipiĝon sur normandian marbordon, nek la elŝipiĝon en nordafrikon, sed por kiuj sufiĉis la invado, la subpremo, la okupacio kaj la publika ofendo de nia lando.

Estas la nacia instinkto, kaj ĝi sola, kiu tuj ĵetis ilin en la batalon.

Tamen Dio bonscias, ke ŝajne nenio antaŭdestinis la plej multajn el ili ludi tian rolon.

Ili ja estis edukitaj sub la signo del' interpopola amikeco duobligita de pacifismo kaj nutris en si nenian kontraŭgermanan malamon.

Cetere estas tre instrupova konstati kaj miascie tiun fakton oni neniam sufiĉe nete substrekis, ke fare de procedo inversa, preskaŭ ĉiuj francaj ultranaciistoj, preskaŭ ĉiuj heredŝovinistoj kiuj, dum sia tuta vivo denuncis taglonge kaj kolumnlonge la germanian danĝeron, la transrejnan trompemon kaj la teŭtonan hipokritecon, ĉiuj tiuj profesoroj de patriotismo, baraktis jam la unuajn tagojn en la koton de l' kunnazia kunlaborado.

\+ + + + +

Tute apud tiuj perfiduloj, estis la hezitantoj, la atendantoj, la prudentoj, la lertuloj, kaj la vero nin devigas konstati, ke la grandaj administracioj del' franca nacio, ĉu civilaj, ĉu militistaj enhavis en siaj vicoj multe tro da naftalenanoj.

Se la nacia instinkto estis la unua de l' imperativoj kiuj nin rezistantigis, ne malpli trafa estis la antaŭenpuŝa forto de nia intima konvinko de la eminenta digneco de la homa persono.

Tiun konvinkon ni lokas je la bazo de tuta la politika filozofio de nia rezistado.

Ne estas digneco sen libereco, kaj libereco sub subpremo.

Respublikanoj, toleremuloj, antirasistoj, ni staras kontraŭ la diktaturon, kontraŭ ĉiajn diktaturojn, kontraŭ la perfortajn solvojn, kontraŭ la aŭtodafeojn, kontraŭ la pogromojn, kontraŭ la rasan segregacion, unuvorte kontraŭ la ekspluatadon de l' homo fare de l'homo.

Ni estas por la kritika spirito kaj la rajto je kritiko, por la penslibereco kaj la pensesprimo.

Ni estas por la diskutado de l' problemoj, la ideokomparo, la kunakordiĝo,

la kunloĝateco.

Ni estas por la memkritiko je ĉiuj ŝtupoj.

Ni estas por la racio kontraŭ la malsaĝo, por la ĝentileco kontraŭ la trivialeco, por la inteligenteco kontraŭ la stulteco, por la kulturo kontraŭ la analfabeteco, por la kuraĝo kontraŭ ĝia malo, por la vero kontraŭ la mensogo.

Unuvorte, ĉar necesas fini, ni estas por ĉio nobla en la homo kontraŭ ĉio malnobla.

Kaj estas ĉar la naziaj armeoj frakasis sub siaj tankoj tiun figuron de l' homo tia, kia ni ĝin vidis, ke realiĝis la sintezo de nia rezistado pere de la intima kunfandiĝo de nacia instinkto, morala devigo kaj nacia memvoleco.

Tiaj estis ni tiuepoke, tiaj daŭre restas ni. La virtoj kiuj estigis nin rezistantoj, ni ilin ĉiam sentas vivantaj en ni kiel antaŭ 35 jaroj.

Tia estas la certeco kiun ni volas hodiaŭ diri al la parencoj kaj la amikoj de tiuj kies ni novan fojon solene memoras la lastan aferon.

Ili sciu, ke iliaj mortintoj ne vane forpasis, ke ili postvivas en nia idealo ĉar ili estis el la sama sango kiel tiuj pri kiuj Karlo PEGI (Charles PEGUY) mortinta staranta por Francio dum la jaro 1914-a, skribis:

> Feliĉaj kiuj mortis por sia fajroplato
> Kaj por la povraj dignoj de l' patrinaj dometoj
> Feliĉaj kiuj mortis por la korpaj urbetoj
> Feliĉaj matur' spikoj kaj rikoltitaj grenoj.

D-ro SALAN

Pont-Saint-Esprit
27/3/1976.






Nous profitons de l'occasion

pour vous faire savoir que des vacances pour adolescents et adultes

proposées par Les Loisirs Educatifs sont économiques
pour
- des groupes de jeunes (garçons ou filles),
- des familles,
- des personnes à titre individuel,

qui accepteraient de séjourner sous forme de camp, (chacun ayant son matériel) au milieu des bois,
dans les Cévennes entre le 5 juillet et le 25 août prochain tout en participant à certains aménagements d'une ruine pour en faire un Centre de Rencontres de Jeunes.

Entre autres activités auxquelles il est possible de participer:
- exploration des Monts Lozère (étude de la nature, photos, etc),
- baignades dans la rivière proche,
- visites de différents artisanats, etc...,
- forge, électricité, maçonnerie, etc.. veillées,

Séjour minimum: 10 jours, avec toutes sortes de participations.

Les cas spéciaux pourront être discutés.

Parents, Jeunes Gens, responsables de Groupes organisés, renseignez-vous sur ces possibilités de vacances agréables dans la montagne ensoleillée et non loin de la mer, en vous adressant à:

LOISIRS EDUCATIFS 11, rue Langevin - 13 - ARLES.



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 2me Trimestre 1976

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes